



# PONTO ☆

*Jaro 3 N-ro 4 (19)    Organo de Sunda Esperanto Agado sept. 2004*

## SEA-kunveno (7-a) en Kopenhago

**sabaton la 2-an de oktobro je la 11-a horo en *Islands Brygges Kulturhus.***

De la Metro-stacio Islands Brygge estas ½ km por promeni. Busveturi ankaŭ eblas - el la alia flanko de Njalsgade. Alveninte la straton, Islands Brygge, iru maldekstren. La celo estas la nigra konstruaĵo en la alia flanko de la strato, ĉe la akvo.



**Tagordo**

1. Elekto de gvidanto
2. Elekto de protokolanto
3. Raportoj pri atingoj de la pasinta SEA-kunsido
4. Raporto pri hejmpaĝo
5. Diskuto pri kursoj kaj aranĝoj – pri la planoj de la kluboj
6. Opinioj kaj proponoj pri la gazeto Ponto kaj ĝia retversio
7. Laborplano por SEA dum la venonta jaro
8. Kiujn celgrupojn ni informos pri esperanto
9. Informmaterialo
10. Daŭrigo de la serio ekskurso kun prelego
11. Aliaj diskutindaj/-endaj temoj (junuloj)
12. Venonta SEA-kunveno

Eblas aĉeti manĝaĵon en la restoracio. Ni celas fini je 15/15,30a h. Ni esperas, ke multaj venos.

Deziras korespondi
RAINER HAUPT,
KAEMMERERUFER 10,
DE-22303 Hamburg, Germanio

Ekonomiska Föreningen Esperanto-Gården inbjuder alla andelsägare till årsmöte



**Lördagen den 9-e oktober 2004 kl. 14.00**
**i Esperanto-gården i Lesjöfors**

Förutom sedvanliga årsmötesförhandlingar behöver vi diskutera ett antal andra frågor och därför är det önskvärt att så många som möjligt deltar.
Fredag kväll samt lördag och söndag förmiddag ska vi försöka förgylla tillvaron med några trevliga programpunkter.

V.g. anmäl er till E-gården
direkt tfn 0590-30909.

## Nova ĝeneralsekretario de UEA

Nia antaŭa Malmöano Ulla Luin, nun loĝanta en Tyresö, elektiĝis kiel Ĝenerala sekretario de UEA, kaj ni elkore gratulas ŝin. Tio okazis en Pekino, kie havis lokon la 89-a universala kongreso kun 2.031 partoprenantoj de 51 landoj, el kiuj 20 estis svedoj.

## Sveda Esperanto-Instituto

invitas al
seminario en la popola altlernejo de Oskarshamn 25-26 septembro 2004 kun variaj programeroj

Ĉiuj estu kore bonvenaj

**Informoj ĉe Bertil Andreasson, tel. 0415-501 52**

Nästa **Ponto**, nr 5
utkommer ca 29 okt.

Skicka allt material till *Karin Lindquist*

senast den 16 okt.

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté*/redakta komitato:*
**Kontaktperson**: *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20
Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Helen Claesson (desegnaĵoj), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado), Gertrud Lund.



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 75 N-ro 4 (687)* >>Ĉiam antaŭen<<   Fondita en 1906


## Karaj membroj, la 100-jara jubileo alproksimiĝas!

Aŭtuna sezono nun komenciĝis kun espereble multaj aktivaĵoj. Jam estas decidite aranĝi la 100-jaran jubileon de la klubo en Malmö en la jaro 2006. Antaŭ nelonge Sveda Esperanto-Federacio, kiu same 100-jariĝas en 2006, decidis okazigi sian jarkongreson en Malmö tiun jaron. Tio signifas ke ni nun havas pozitivan respondon kaj de SEF kaj de DEA pri komuna kongreso. Ĝi okazos dum la Tagoj de l´Ĉieliro (Kristi Himmelfärdshelgen) la 25an - 28a de majo 2006.

Estos granda aranĝo, kiu postulas ke ĉiuj engaĝiĝu en la multaj taskoj. Kaj ni volas komenci la preparlaborojn frue! Sekve la estraro decidis aranĝi esperantan kurson por la kongresa komitato dum la preparlaboroj pri la jubilea kongreso kaj ĝi startos ĉi-aŭtune.

Ne sufiĉas ke ni okupu nin nur pri la estonta jubileo sed ni ankaŭ devas dume disigi informojn pri esperanto.
Sten Svenonius
Prezidanto de Klubo Esperantista de Malmö

## Kursoj

Sten gvidos kurson por komencantoj sabate la 11-an de septembro inter 10.00 kaj 13.00.h

Kjell kiel kutime gvidos la konversacian kurson ĉiulunde.

## Esperantoinformo

La komunumo ebligis al idealismaj asocioj prezenti siajn aktivaĵojn kaj en Gustav Adolfs torg/laŭlonge de S. Förstadsg sabate 28.08 kaj en Beijers Park dimanĉe 5.09.

Klubo Esperantista de Malmö partoprenis en ambaŭ aranĝoj, informante pri nia lingvo kun bona rezulto.
La interesuloj estis scivolemaj kaj volis diskuti pri Esperanto kontraŭ aliaj lingvoj. Ne nur ni disigis la informfoliojn en S. Förstadsgatan, ankaŭ la forta vento helpis nin!

Al Beijers Park la postan dimanĵon venis multaj Kirsebergano por ĝui la sunan veteron kaj multaj interesuloj vizitis nian tendon kaj scivoleme ricevis informon pri esperanto.

Per-Olov
Johansson




Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27*
*MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius* *sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77


## En la arbaro de Pålsjö 13.6

Modela preparo de la Esperantoklubo de Helsingborg igis nin bonege ĝui belan tagon en la arbaro de Pålsjö.



Dum la migrado ni spektis la multajn vidindaĵojn tie, ekz. la palacon kaj la migradhejmon Thalassa.

Apartan promenon ni faris al la tombo de Gustaf Henrik Backman, kiu estis bonkonata esperantisto.

Dum paŭzo ni piknikis kaj la tago finiĝis per kaftrinkado ĉe la Paviljono de Pålsjö.

Koran dankon al la Helsingborganoj pro via aranĝo.

Partoprenantoj de Malmö

## Franca vizito 13.7

Juna francino, Mélanie Maillard, kiu i a studas la svedan lingvon, faras dum la somero rondvojaĝon en tuta Svedio kaj alvenis al Malmö por viziti nian klubon kaj rakonti pri Esperanto en sia hejmlando.

Ŝi ankaŭ havis multajn demandojn pri la vivo ĉi tie.

La postan tagon Elisabeth Deber, Gerd Rodén kaj Karin Rylander rondiris kun ŝi en Malmö.

Gertrud Lund

## Tagordo 10.11

1. Elekto de protokol-kontrolanto
2. Diskuto kaj decido pri printempaj kursoj
3. Diskuto kaj decido pri printempaj programeroj
4. Eventualaj elektoj
5. Abono je esperantogazetoj
6. Raportoj kaj informoj
7. Ceteraj demandoj

# Kontaktilo

*Membrogazeto de K.E.K*
*Konversacia Esperantista Klubo*
*Kopenhago*

N-ro 4 (657) septembro 2004 68-a jaro




**RIMARKU!**
**Retadreso**
**Interreta aliro ekzistas en la klubejo ĉiulunde, kaj eblas por la klubo sendi kaj ricevi interretmesaĝojn, ĉar nun ni havas interretadreson:**
**defakek@hotmail.com**
**Rakontu pri tiu adreso al viaj esperanto-rilatuloj. Ni esperas, ke tio faciligos kontakton inter la kopenhagaj esperantistoj kaj la tuta mondo.**

## Informoj

**Kutimaj horoj en la klubo:**
**Kafo/teo-trinkado 19.30 - 20.00.**
**Programoj 20.00 – 20.45 + 21.00 – 21.45.**
**Komuna manĝado la unuan lundon de la monatoj je h 18.30: Buterpanoj mendeblas ĉe Ruth, tel 3646 6279, aŭ kunportu mem**

**La biblioteko:**
El la ceteraj libroj, kiuj restas en la kelo ĉe Ole, ni kunportis en la klubon 15 ekzemplerojn. Vi estas bonvena prunti el tiuj libroj. Post 2 monatoj ni ŝanĝos ilin al 15 aliaj libroj.

**Nia oferto ĉi-aŭtune - ĝis Novjaro:**

**<u>Sezonstarto 13/9 - legogrupo kaj studgrupo:</u>**
Por daŭrigantoj Arne Casper aranĝas legogrupon (temo: fabeloj de H.C.Andersen) ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45 de 13/9 ĝis 6/12.

La studgrupo funkcias ĉiun duan lundon - komenco 13/9 kaj poste 27/9, 18/10, 25/10, 8/11, 22/11 kaj 6/12 - ni daŭrigos la laboron pri la libro de Kolker: 'Vojaĝo en Esperanto-lando´ -voĉlegado, tradukado (se necese), diskutado, lingvaj interesaĵoj ... se estas intereso, grupeto povos daŭrigi ankaŭ la laboron pri H.C.Andersen-fabeloj, kiun ni pasintvintre komencis. Gvidantoj Bent kaj Lene.

<u>Sezonstarto 4/10 - kurso por komencantoj:</u>
Komencantojn instruas Bent Jensenius ĉiulunde 17.45-18.30 kaj 18.45-19.30 de 4/10 ĝis 6/12

La prezo por partopreni kurson, legogrupon aŭ studgrupon estas 250,00 DKK, se oni ne estas membro en unu el la du kluboj (KEK aŭ DEFA). Se oni estas membro, la partopreno estas senkosta. Parolu kun la du kasistoj, Karen Olsen kaj Arne Casper.

**Kluba raporto**
Unue jen malnova raporto (pro spacomanko):
**8/3**
"Kial mi fariĝis esperantisto" –ĉiu kun plezuro rakontis: Bent J., Ole kaj Eugeniusz: La ideo ŝajnis bona al ili. Zita kaj Henning: Ŝatas la lingvon kaj la kuneston. Lene: La bona etoso inter la esperantistoj. Uwe: Vivas en multlingva regiono kaj havas intereson pri lingvoj. Bjarke: Intereso pri la mondo kaj komuna lingvo.

**Forpaso**
Maria Henriksen forpasis la 4-an de julio 72-jaraĝa. Malsaneco forprenis ŝiajn fortojn. Maria estis multjara membro en KEK. Kiam la laborista sekcio, LEK, ekzistis, ŝi apartenis al ĝi.



Nun ŝi mankas al ni dum la kunvenoj. Ke ŝi ripozu en paco!

Pliaj vortoj pri Maria legeblas en *Esperanto en Danio* kaj en *Dana Fervojisto.* Eĉ ni vidis bildojn en la reto de la entombigo.

Bent W.: Scivolemo pri la simpla gramatiko. Jytte: Deziris esti inter gajaj homoj. Karen: *ne restis tempo por ŝia klarigo.*

Jen io pri kelkaj el la aliaj kunvenoj:
**14/6**
*Cito el Dana Fervojisto:* Dum la unua duono de la programo Henning "lekciis" pri la ne tro bona stato de Esperanto rilate terminologian evoluon. Li bazis sian parolon je eldiroj de la eminenta interlingvisto Detlev Blanke okaze de la preskaŭ eŭforaj sentoj pro la trakto de Esperanto en komisiono de la Eŭropunia Parlamento. – Dua parto de la vespero estis spektado de filmo pri balonfesto.



**10/7**
La somerekskurson tra Kopenhago ĝis Amager partoprenis malmola kerno de 7 personoj. Ni suplementis unu la alian pri la vidindaĵoj. La ripozloko estis idilia – ni vere ujutnis. Ni renkontiĝis kun Kim, kiu loĝas, kie ni devis preterpasi. Tiam ni interrompis la


**Daŭrigo pago 4**

Daŭrigas de p. 3
ekskurson pro fortomanko. Samtempe la vetero fariĝis malbona. Helgoland Banejon oni nu renovigas.

**12/7** Hungarino interese kaj vigle rakontis pri sia patrio temante Esperanto-historio. (Cetere ŝia intereso pri framasona ordeno estis enorma. En Hungario ŝi estas ano de ĝi. En Danio tiu asocio estas alispeca.) – Poste Kim helpis nin per sia harmoniko, kiam ni provkantis selektitajn kantojn.

**19/7** Jen 5 - ☆ aranĝo: Karen ankoraŭfoje preparis al ni pri la naturo. Ĉiu el ni ricevis sian ekzempleron de spicherboj por klarigi pri ĝi. Poste ni el sako devis preni objekton, kio estis figuro de sovaĝa besto. Perlo!

**26/7** Bent Wiinberg vigligis la gramatikeron, *participojn* al ni. La temo estis pritraktita de: Zamenhof, Friis, Sasha (studanto en Karlskoga), Svend Dragsted, Teo Jung, Kalocsay kaj Waringhien. Bent disdonis al ni kopion de ĉiuj trajtaĵoj + eltiraĵo el la reto: Ni parolas Esperanton (bazgramatiko).



## Klubo Esperantista de Helsingborgo

### Gekaraj!

La longe dezirata somero forflugis tre rapide. Jam komencis la aŭtuna semestro. La 15-an de aŭgusto niaj fidelaj klubanoj renkontiĝis en la ĝardeno de Barbro por interŝanĝi rememorojn kaj spertojn de la pasinta somero.
Bedaŭrinde neniu el ni havis la eblecon partopreni la ĉi-jaran Universalan Kongreson en Pekino. Tamen, Barbro partoprenis la antaŭan!

Nia ekskurso al Pålsjö la 13-an de junio logis 11 partoprenantojn. Tiu dimanĉo estis tago kun mirinde bela vetero, kontraste al la antaŭa kaj posta semajnoj, kiam pluvis preskaŭ ĉiun tagon. Dum la proksimume kvar-hora promenado la partoprenantoj havis eblecon aŭskulti rakontojn pri la arbaro, palaco, muelejo kaj tombejo de Pålsjö, kaj pri la migrul-hejmo Thalassa.



Dum la promenado ni ankaŭ vizitis la ripozejon de la Esperanto-pioniro Gustaf Henrik Backman, kiu eldonis la unuan svedan lernolibron de Esperanto en la jaro 1892. Li multe laboris por Esperanto dum sia 61-jara vivo, kaj dankemaj esperantistoj starigis ŝtonon kun ora stelo sur lia tombo.

Kiel memoraĵo de la ekskurso ĉiuj ricevis kolekton de niaj rakontoj dum la promenado. Anna-Maria Lange poste, nome de la partoprenantoj, sendis dankleteron kaj aldonis afablajn komentojn al niaj tekstoj. Ni kore dankas!

Niaj planoj por la aŭtuno ne estas ampleksaj. Ni daŭrigas nian merkredan studrondon en septembro, oktobro kaj novembro. La dimanĉaj renkontiĝoj estos 19/9, 17/10 kaj 21/11, kiel kutime en Faktorsgatan 5. En decembro ni kalkulas je aranĝoj en Malmö kaj Kopenhago (Zamenhof-festo).

**Agrablan aŭtunon!**

**Ann-Louise**

## La Esperanto klubo de Lund

### Karaj LEK-anoj,

Bonvenon al nova agadsezono. Kiel pli frue anoncite, ni renkontiĝos la 16an de septembro je 18.30 h. Ĉiuj kontribuu per someraj memoroj.

Kristina Takman prezentos sian hejmregionon Vermlando kaj A-M Lange konatigos vin kun EsperantoDomo en Lesjöfors rakontante precipe pri la tiea internacia semajno. Ni montros videofilmon kaj aŭskultos muzikaĵojn. Nekutime multaj elstaraj muzikistoj kaj muzikantoj ĉeestos, inter ili nia flutistino Ebba. Vidu kalendaron!

Ne maltrafu la prelegon de Mårten Österlind, SEJU-membro, kiu parolos pri sia specialaĵo: Runoj kaj runlingvoj. Vidu kalendaron!

**Kursoj:**
Dum la unua kunveno vi povos aliĝi al konversacia grupo. Krome estas serĉataj interesuloj por kompilado kaj tradukado de tekstoj pri vidindaĵoj en Lund. Ni planas renkontiĝi en ĵaŭdoj sen ordinara kunveno.

**Laste: Medborgarskolan en Lund ofertas ĉi-semestre esperanton por komencantoj (merkrede 18.00) kaj por pensiuloj (merkrede 10.30).**

**Belan aŭtunon deziras nome de la estraro Anna-Maria Lange**



| | | |
|---|---|---|
| Lunde 06.09 | KEK/DEFA, Kph | Post la 6a Eŭrop-Unia Kongreso en Bilbao Partoprenintoj rakontos |
| Merkrede 08.09 | KEKG, Kopenhago | Vojaĝo en tempo kaj spaco. Rakontoj kun lumbildoj en Kolombio, Brazilo kaj Paragvajo. Prelego de Bent Jensenius |
| Lunde 13.09 | KEK/DEFA, Kph | Stud- kaj legogrupoj |
| Jaŭde 16.09 | LEK, Lund | Ĉiuj kontribuu per someraj memoroj |
| Dimanĉe 19.09 | KEH, Helsingborg | Dimanĉa renkontiĝo |
| Lunde 20.09 | KEK/DEFA, Kph | Ĝusta elparolo - necesa por plena kompreno - Henning gvidos vin! |
| Merkrede 22.09 | KEM, Malmö | Somerajn memorojn rakontos ĉiuj ĉeestantoj |
| Lunde 27.09 | KEK/DEFA, Kph | Studgrupoj. Informvespero por novaj klub-/kursanoj |
| Lunde 04.10 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj. Bent W. ludigos nin |
| Merkrede 06.10 | KEM, Malmö | Notoj pri Hamburgo - Gertrud Lund,<br>Spertoj de Skotlando - Asta Schaedel |
| Lunde 11.10 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj. Pri la 56a Internacia Fervojista Kongreso en Sopron, Hungario. Partoprenintoj rakontos. |
| Jaŭde 14.10 | LEK, Lund | Vermlando kaj EsperantoDomo en Lesjöfors -<br>K. Takman kaj A-M Lange rakontos |
| Jaŭde14.10 | KEKG, Kopenhago | ”Lingvistikaj revolucioj”. Ege interesa prelego de Jens S. Larsen |
| Sabate 16.10 | KEM, Malmö | Aŭtuna festo. Prelego de Ileana Schøder pri la EEU-Konferenco en Bilbao. Vidu apartan programon. |
| Dimanĉe 17.10 | KEH, Helsingborg | Dimanĉa renkontiĝo |
| Lunde 18.10 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Lunde 25.10 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Merkrede 27.10 | KEM, Malmö | Esplorinte la grekan insulon Samos Karin kaj Bernt Lindquist rakontos kaj montros bildojn |
| Lunde 01.11 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj. Informoj pri la UK-loko 2005, Litovio<br>La krepuska sezono |
| Lunde 08.11 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj, studgrupoj |
| Merkrede 10.11 | KEM, Malmö | Ordinara kunsido. Tagordo p. 2. Lingva kvaronhoro |
| Jaŭde 11.11 | KEKG, Kopenhago | ”Ekbruligis mi fajron en kor´”. Pri la rusa blindulo kaj poeto Vasilij Eroshenko. Prelego de Alexander Kogan |
| Jaŭde 11.11 | LEK, Lund | Runoj kaj runlingvoj - Mårten Österlind |
| Lunde 15.11 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj, numerludo |

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

## Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.

La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

## La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.

Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange, Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt, allan.ljungstedt@telia.com

## Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.

La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

## Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.

Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn tie. Prezidanto: Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk
tel. 0045-44 48 47 26

## Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG

Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport, salono n-ro 1, dua etaĝo.
Pordoj malfermitaj 19.00-23.00. Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57, DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
rete: tsvendsen@webspeed.dk

## Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA

Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en Banedanmark, entreprise, Vasabygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krad)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@mail.dk
Kluba retadreso: defakek@hotmail.com

## Harold Brown

La 12an de majo kvardeko el la amikaro de Harold Brown kolektiĝis en la paroĥa domo de Högsby por memori pri li. Harold forpasis la 10-an de marto post kelkjara grava malsano.
Diversforme li priskribis sian interesan kaj varioplenan vivon.
Krom pentristo, grafikisto, filozofo kaj granda humanisto li estis elstara esperantisto. En esperanto li verkis i.a. la teatraĵarojn ”Eduko danĝera ”, ”Leteroj el Svedio”, kaj kune kun Kerstin Rohdin li tradukis ”Emilo en Smolando” kaj ”Svedio du bildoj”.

En tiu tago la pola aktoro Jerzy Fornal prezentis la unuaktaĵon de Harold ”Vagabondo”. Kerstin transdonis bonegan de ŝi tradukitan version al neesperantistoj. Estis kortuŝa prezentado kaj la kulmino de bela tago por honori la memoron de Harold.

Du libroj de Harold en la angla: ”Five self portraits” kaj ”Always summer”, estis prezentitaj de Lars Forsman en Hirundo. Ili aĉeteblas ĉe Kerstin Rohdin, Garvargränd 6, 579 30 Högsby
kaj ankaŭ en Malmö- kaj Lundaregionoj ĉe Karin Lindquist 040-98 01 20 kaj Anna-Maria Lange 046-14 73 09.

Prezo: Por la du libroj SEK 250 kr. Por nur unu libro . 150 kr.

Ulla Saether

Intervjuo kun Boris Kolker de V. Aroloviĉ kaj G.Kokolija:

**Kiel vi rilatas al la konkurenco inter la angla lingvo kaj Esperanto?**
Mi ne vidas konkurencon inter ili. Ambaŭ havas siajn niĉojn, same kiel kelkaj aliaj lingvoj, uzataj en internacia komunikiĝo. Anstataŭ batali *kontraŭ* la angla lingvo estas preferinde labori *por* Esperanto: informi, instrui, apliki, kongresumi, verki, legi, skribi, korespondi, kanti, krei esperantistajn familiojn; eĉ iam simple babili Pri bagateloj - la lingvo vivas nur en uzado.

**Kion vi opinias pri ĝenerala stato de la lingvo Esperanto kaj E-movado nun? Ĉu ĝi progresas dum lastaj jaroj?**

Mi trovas la nunan ĝeneralan staton de la movado nemalbona kaj ligas multajn ĝiajn estontajn sukcesojn kun Interreto. Iam Laszlo Szilvasi trafe diris, ke Esperanto kaj Interreto estas kvazaŭ kreitaj unu por la alia. Tiun proksimecon indas eluzi maksimume.